

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

EN LA NUMERO:

•
ODO PRI LA PACO

•
GENERACIAJ ASPEKTOJ
DE LA E-MOVADO

•
LA PENETRO DE
ESPERANTO
EN BULGARION

•
TITANO DE LA
NACIA REVOLUCIO

•
VERKISTO-KOMUNISTO

•
GASTE AL
ELI URBANOVA

•
LINGVAJ PROBLEMOJ

•
JUNA ESPERANTISTO

•
VERDAJ STELETOJ





ODO PRI LA PACO

de Orlin ORLINOV

Mi ne povas silenti, homoj!
La tempo postulas decide,
ke novan odon
mi verku rapide,
novan odon
pri malnova temo,
malnovan kanton
kun nova melodi'...
Malatentu tiun,
kiu diros,
ke tiu ĉi temo
ne rilatas
al ĉiuj ni!
Tio ĉi estas sorto,
Tio ĉi estas antaŭdestino,
Tio ĉi estas batalo,
kaj se estas batalo —
ne estas loko por profitinklino!
Homoj,
ĉu vi ne vidas
kio okazas!
La paco estas kolombo buntpluma,
sed akcipitro feroca
ĝin trankvila ne lasas.
Tie ĉi ne temas
pri fantomoj
kaj malsana ambicio,
tie ĉi temas
pri pozicio!
Ne temas
pri metodo
rigida aŭ fleksebla —
temas pri jeno:
aŭ vivo
aŭ mort' neevitebla!
La paco ne estas
fabelo de fratoj Grimm,
la paco
ne estas ŝminkita mim' —
la malprudento
surmetis
anĝelan maskon,
se ni demetus la maskon —
ni vidus kaskon!
Ni vidus kranion

kun masko kontraŭgasa fia,
nin ĉirkaŭblovus
frosto subtera glacia!
Jen pro tio
ne estas pli fiaj,
ne estas pli krimaj
ol la teorioj
pri lokaj militoj!
Milito loka
plus
milito loka
egalas finfine
al milito universala!
Kaj se ascendus sur la scenejon
tiu ĉi protagonisto —
tio ĉi signifus
finon de la mondo,
finon de la homa ekzisto!
Mi volas nenium timigi
per tia katastrofa fino —
sed el tiu ĉi verda perlo
restus nur ruino!
Hiroŝimo
estis bagatelo
kompare kun la naŭa fajra
ondego,
kiu nin dispistus kiel abelojn!
Tie ĉi ne estas loko
por frenezula pozkonduto!
Ununura estas la karto!
Nur unu estas la atuto!
Kaj por „rezigno“
estas eblecoj neniam!
La rezigno egalas
al pereoj
kaj morto niaj!
Tie ĉi ne estas loko
por diskutemo pri politiko —
estas raketoj
kaj kosmospaco!
Se tiuj ĉi argentkoloraj ŝarkoj
komencus flugi —
eĉ Noa per sia arkeo
ne trovus
kien sian kaprinon konduki!

Sed ja mi komencis
verki odon!
Kaj kio rezultis!
Ĉu mi konfuzis
de mia penso la iradon!
Kaj ĉu efektive
mi faris eraron?
Ne, ne estas eraro!
Se estas
minacita
la sorto de l'homaro!
Antaŭ la risko
jam staras kuna moleo,
decidemo kaj trankvilo sen limo...
Moskvo estas tie!
Kaj se Moskvo estas tie —
ne estas hazardo!
Estas juro,
kiun la vivo forĝas ĉiun mo-
menton,
ĝi malfermas okulojn,
ĝi alvokas la prudenton!
Juro
pli forta ol halucinoj
pri ruinoj kaj sangverŝo plua:
USSR
ne premos
la butonon
la unuan!

Vorto farita
al la mondo apartenas
kaj neniam revenas!
Kolombo,
duone savita,
vi ne estos unue
de rusa flamo
fajrovundita!
Se ne estus vi,
Soveta Unio,
delonge estus ekflugintaj
la raketoj Cruise!
Spite al Jesuo!
Spite al Dio!
Kaj estas evidente,
se antaŭ niaj okuloj
tute malkaŝe
kaj ne en sonĝo
pereas infanoj
kaj nigraj fantomoj
el paradizaj anguloj
faras Sodomon!
Se revivigus
caro Salomono —
pro ploro kaj ĝemo
li perdus mentsenton!
Mi ne scias ĉu estas komplike
aŭ simple,
sed kie mi trovus alian peton:
hej, vi, tre saĝaj
dekdu apostoloj —
kunvenu al
vespermango malsekreta!
Pensu, homoj!
Ni ekkriu ĥore, mi petas!
La paco estas kolombo,
kolombo kun plumaro buntko-
lora!
Sole jena estas la slogano:
for la teroron!
Aliancon kun USSR

El la bulgara:
DIMITAR ĤACIEV



GENERACIAJ ASPEKTOJ DE LA ESPERANTO-MOVADO

D-ro HUMPHREY TONKIN

Ni rigardu unue la maljunulojn. Pri la kresko de la nombro da maljunaj homoj en la socio ni ĉiuj konscias. Pro rapida progreso en la medicino, higieno, eĉ en la nutrado, ĉie en la mondo la homoj vivas pli longe kaj pli longe guas plenajn fortojn. En multaj landoj falas la aĝo de pensiigo, tiel ke kreiĝas granda grupo da homoj, kiuj bezonas siajn apartajn sociajn servojn, sed kiuj samtempe povas tre utile kontribui al la socio laŭ diversaj manieroj.

Due, ni ĵetu rigardon al la iunuloj. Kresko de la nombro da junuloj ja ne okazas en la industriaj landoj. Malgraŭ tio, ekonomiaj kondiĉoj estas tiaj, ke senlaboreco inter gejunuloj estas ofte granda problemo. En evoluantaj landoj tamen, la proporcio de junuloj en la socio estas tre granda, kaj eĉ tie, kie la nombro da naskoj ne kreskas, pli da homoj travivas la infanecon. Tio kaŭzas grandajn streĉojn ĉe la edukaj instancoj. Aldoniĝas la manko de teknike edukitaj homoj por kreskanta industrio, la problemoj de migrado al la urboj, la kreiĝo de junulara kulturo. Plej grave, la homoj de junaj generacioj vivas en mondo rapide ŝanĝiĝanta. Ĉie en la mondo la iamaj studprogramoj devas esti adaptitaj al la novaj bezonoj de ekonomie, teknike kaj kulture interligita mondo. La homoj de 1915 aŭ de 1940 kapablis grandskale perturbi la mondon, sed ĝi eltenis. Tiuj de 1982 kapablas detrui ĝin. La industrio de antaŭ cent jaroj kapablis malpurigi la vivkondiĉojn de urboj kaj regionoj. Nun tiuj minacoj fariĝis mondskalaj.

Se ni volas esplori la problemojn de maljunaj homoj kaj de junuloj, ni unuavice komencu per nia propra medio. Ni estas anoj de unika lingva komunumo, tutmonde disvastigita. Kiaj estas la demografiaj aspektoj de nia movado? Ni rimarkas dupolusan aĝdistribuon: multaj junuloj, multaj maljunuloj, relative malmultaj homoj en mezaj generacioj. Kial la gejunuloj ne restas en la movado? Versajne multaj forĵalas, ĉar ili ne trovas adekvatan kontentigon de siaj

idealoj. Aliaj elfalas pro familiaj aŭ profesiaj devoj. Kiel ŝanĝi situacion? Kiel teni alte kaj firme tiujn idealojn de la gejunuloj? Kiel porti Esperanton en la familian kaj profesion vivon de la mezaĝuloj?

Kaj al maljunaj homoj ĉu Esperanto ne ebligas tranĉon de tiu kateno, kiu dum jaroj ligis ilin al ilia profesio, al iliaj lokaj devoj? Maljunaj homoj havas la tempon vojaĝi, la tempon ĝui aliajn kulturojn kaj lerni pri ili. Sed malfacile ili lernas lingvojn. Tamen, inter la lingvoj Esperanto estas la plej facila. Ĝi estas lernebla kaj uzebla de maljunaj homoj. Kiel ajn oni rigardas ĝin, Esperanto estas kultura fenomeno kaj eduka rimedo brile utila al junaj homoj kaj al maljunaj, al homoj ĉe la sojlo de la kariero kaj al homoj apud ĝia fino.

Se temas pri la Esperanto-movado mem, maljunaj homoj havas la tempon kaj la sperton por eĵe dediĉi sin al la laboro. Foje oni malspacienas pri la granda, eble eksterproportia rolo de maljunaj homoj en nia movado. Kial? Oni per tiaj pensoj eraras. Maljunaj homoj donas al ni tiun kontinuecon, tiun sindediĉon, tiun obstinon, kiujn nia miriga socia movado bezonas. Ili estas esenca elemento en nia agado. Kaj se temas pri junuloj, ili alportas novajn ideojn, novajn formojn de organiziĝo, novajn kulturajn valorojn. Sed se gejunuloj fondadas niajn instituciojn, maljunaj homoj daŭrigas ilin. Se gejunuloj alportas ideojn, ofte maljunuloj realigas ilin. La forto de nia movado kuŝas en nia kapablo utiligi la talentojn de ĉiuj homoj, junaj kaj maljunaj, en la agado por Esperanto. La idealismo kaj la obstino, la novaj ideoj kaj la forto persisti — ĉio ĉi alportis nian Esperanto-movadon ĝis la hodiaŭaj tagoj, ĝis ĉiam pli hela estonteco. Jen do la mesaĝo por Unuiĝintaj Nacioj: ni pretas, nia lingvo pretas, kaj iom post iom la socio kaj la sociaj bezonoj pretiĝas por la Internacia Lingvo.



LA PENETRO DE ESPERANTO EN BULGARION

(Daŭrigo de n-ro 1/1983)

En 1893—1894 la gazeto „Svjat“ aperigis serion da artikoloj pri Esperanto, kiuj formas kompletan studon pri tiu lingvo kaj ili aperis ankaŭ broŝurforme sub titolo „Tutmonda Revo...“, listigita en la Nomaro de E-literaturo sub n-ro 69 (en la jaro 1894). Sed ne ĉio funkciis glate. La unuaj pioniroj de Esperanto en Bulgario devis batale trabori alsi vojon pro la kontraŭstaro de aŭtoritataj sciencistoj. Unu el illi estas docento D. Matov, filologo. En la sciencista organo „Balgarski Pregled“, n-ro 11—12, de julio-aŭgusto 1894 li kritikas ne nur Esperanton, sed ankaŭ la socialisman ideon. Tiu duobla kritiko kontraŭ la ideoj socialisma kaj internacilingva provokis ĉe N. Kovaĉev firman kontraŭstaron. En 1895, respondante al la sciencistaj kritikoj, li trankvile asertas: „Kaj se temas pri la internacia lingvo Esperanto ni ne devas koleri, ĉar ĉe ni oni ignore pri-traktas tiajn ideojn, sed venos la tago, kiam ni ĉiuj eksentos la bezonon pri tia internacia lingvo, precipe por la komercaj rilatoj“. Estante progresema esperantisto, Kovaĉev prenis sub sia protekto ankaŭ la socialismon: „Ĉe tiom malbona situacio, en kiu troviĝas la laboristoj en nia lando, kreiĝas favoraj kondiĉoj por fonda ankaŭ de socialisma partio, kiu prenis sub sia protekto la laboristaron kaj zorgas pri plibonigo de ties sorto. Rezulte de tio nun la socialismo faras gravajn saltojn antaŭen kaj ne estas malproksime la epoko, kiam tiu ĉi juna, miniatura partio fariĝos la plej forta, la plej granda kaj dinamika partio, celanta reorganizi la tutan ŝtatan ordon. La postuloj de niaj socialistoj ŝajnas al ni utopiaj, sed se ni trafolumos la historion, ni konstatos, ke en sia komenciĝo ĉiuj plej grandaj faroj de la homaro aspektis nerealegeblaj!“

En 1895 aperis la dua bulgara Esperanto-lernolibro, de Hristo Popov. Per ĝi la bulgaraj esperantistoj daŭrigis la varbadon por Esperanto. En la sama jaro (1895) pro ricevita 200 protestaj leteroj kontraŭ Esperanto-propagando N. Kovaĉev transportis sian E-

agadon sur la paĝoj de ĵurnalo „Nedelja“.

Tri gravaj eventoj en la bulgara E-movado okazis en 1896: a) La ĵurnalo „Mir“ (Paco) aperigis recenzon de Kovaĉev pri la lernolibro de Hr. Popov. Tiu recenzo fakte estas longa poresperanta artikolo kun bonaj informoj pri la historio de la bulgara E-movado. b) En tabulo aperis 58 arte aranĝitaj portretoj de E-aktivuloj el la tuta mondo honore al eldonisto de „Esperantisto“ Trompeter, (1892—1894). En tiu internacia elpaŝo partoprenis du bulgaroj: M. Bogdanov, tiam studento en Genevo kaj N. Kovaĉev el Sofio. c) Estis fondita la tria loka E-organizo en Bulgario: Esperantista Societo „Lumo“ en urbo Veliko Tŕrnovo.

La jaro 1897 estis jubilea. Okaze de la unua jardeko de Esperanto (1887—1897) Hr. Popov aperigis grandan informan artikolon en la prestiĝa literatura-kritika gazeto „Misâl“ (Pens). Krom tio, N. Borovko, prezidanto de la Esperanto-Societo „Espero“ en Petrograd — verkis studon pri la historio de la esperantista movado en la mondo kaj tie al Bulgario estas destinita digna loko. Estas kortuŝaj mensioj pri M. Bogdanov, pri la Esperantista Klubo de Sofio, pri la gazeto „La Mondlingvisto“.

M. Bogdanov kontribuis ne nur por vastigo de Esperanto en Bulgario (1887—1895), sed ankaŭ en Svislando (1895—1897) kaj en Belgio (1897—1898).

Pri tiu periodo d-ro L. Zamenhof diris (1907): „Multaj el vi konas la historion de la lastaj dek jaroj... kiam la longe dormintaj semoj komencis doni la unuajn trunkojn; sed tre malmultaj el vi konas la historion de la unuaj dek jaroj, kiuj konsistis el senfina, ŝajne tute sensukcesa semado. La historio... iam rakontos pri ĉiuj tiaj semantoj“. En Bulgario tiu peniga periodo daŭris ne dek, sed dekdu jarojn.

En 1898 venis impulsaj instigoj el eksterlando. Jus fondiĝis la Franca Societo por Propagando de Esperanto (FSpPE), kies organo „L'Esperantiste“, presata dulingve (en Esperanto kaj en franca lingvo) kontribuis por

perfektigo de deko da bulgaraj esperantistoj jam per sia unua jarkolekto. La Franca Akademio pri Moralaj kaj Politikaj Sciencoj aprobis la tezojn de la svisa profesoro Ernest Naville pri Esperanto. Por la esperantigo de prof. E. Naville multon kontribuis la unua bulgara esperantisto, M. Bogdanov, kiu dum la jaroj 1895—1897 studis en la Universitato de Genevo.

Komence de 1898 M. Bogdanov finis siajn universitatajn studojn en la Universitato Libera de Bruselo kaj doktoriĝis pri juro. Li revigligis la E-movadon. Estis restarigitaj la lokaj E-organizoj en Sofio kaj en Veliko Târnovo. Neoficiale funkciis E-grupo en Vidin. Sekvis nova elpaŝo de bulgaraj esperantistoj en internacia tereno. En gazeto en Peterburgo aperis maljusta kritiko kontraŭ Esperanto. La sekretario de la rusia E-organizo (K. Ostanieviĉ) alvokis la mondan esperantistaron skribi al li argumentitajn lerojn kun fotoj de la sendintoj, por ke „Espero“ aranĝu propagandan vitrinon en Peterburgo. Post unu monato K. Ostanieviĉ ricevis 62 lerojn kaj fotojn. El ili du estis ricevita el Bulgario. Skribis Bogdanov el Sofio kaj Ilarion Rajĉev el Vidin.

Dum la unua duono de la jaro 1899 la E-agado daŭre fluas en tre miniatura skalo, kiu tamen

sufiĉis por akumulado plue energion de sperto por plivastigi Esperanton en nia lando kaj ĉe bezono eksporti helpon al eksterlando. Okazis tamen novaj dislokigoj de gvidaj esperantistoj: M. Bogdanov forveturis al Kjustendil, kie li okupis postenon de notario; G. Oreŝkov translokiĝis de Gorna Orjahovica al Veliko Târnovo por la sama posteno — ĉefo de la poŝtoŝeĉejo. El tiu urbo Oreŝkov skribis sian poste famiĝintan leteron al gazeto „Jivot“ (Vivo). La redaktoro ne nur ĝin aperigis, sed ankaŭ komentis ĝin tre favore. Nun estas konataj la nomoj de 58 geesperantistoj el 16 urboj kaj 5 vilaĝoj, kiuj aktivis por Esperanto dum tiu 12-jara periodo (1887—1899).

La vivo kuris. Mankis simptomoj pri nova periodo en la disvolvo de la bulgara E-movado, sed tiu venis neatendite kaj surprizis la publikon kaj en Bulgario kaj en eksterlando. Ne estis surprizitaj nur dekkelkaj ekstreme aktivaj esperantistoj, sur kies ŝultro pezis la konstanta devo pruvi al la homoj, ke Esperanto ankaŭ estas necesa kaj ĉiam pli kaj pli necesa al la internacia vivo por paco, por kunlaboro kaj intensa interŝanĝo de spiritaĵoj, por ĉiufanka progresado.

Canko MURGIN

SEMINARIO DE FAKULOJ EN GDR

Dum la lastaj jaroj ĉiam pli elstaras la graveco de plua apliko de Esperanto en la scienco kaj tekniko. Pruvo pri tio estis la okazigo de Internacia Seminario de Fakuloj. Ĝi okazis de la 7-a ĝis 12-a de decembro 1982 en Bad Saarow (GDR) kaj estis organizita de la Esperanto-Asocio de Germana Demokratia Respubliko, sub la aŭspicio de UEA. Partoprenis 34 reprezentantoj el 11 landoj — elstaraj fakuloj en siaj profesioj kaj aktivuloj en la E-movado je landa kaj internacia nivelo. La fakan agadon de Bulgara Esperantista Asocio kaj ĝiajn riĉajn spertojn prezentis Violin Oljanov, ing. Angel Todorov kaj ing. Petâr Todorov.

La pritrakto de lingvistikaj kaj terminologiaj problemoj en la evoluo de la Internacia Lingvo okupis ĉefan lokon. Bazon por viglaj diskutoj donis la prelegoj „Problemoj de lingvosciencia terminologio en Esperanto“ de Michel Duc Goninaz (Francio), „Terminologio — la internacia scienco el planlingva perspektivo“ de ing. O. J. Plehn (Aŭstrio), „Terminologiaj E-problemoj pri la nomado de bestoj kaj plantoj“ de d-ro Wim de Smet (Belgio),

„La lingva evoluo de Esperanto el vidpunkto de komputistoj“ de ing. Antal Mûnich (Hungario). Prof. d-ro Paul Neergaard (Danlando) kaj ing. Jan Werner (Ĉeĥoslovakio) prelegis pri la principoj de faklingva normigo. Estis ĝustigita kaj klarigita la strukturo kaj funkcio de la Terminologia E-Sekcio ĉe la Scienca Eldona Centro de UEA en Budapeŝto.

Tre utila estis la interŝanĝo de informoj pri diversaj fakaj aranĝoj, kunordigado kaj ties malhelpoj en internacia skalo. Parolis la UEA-estraranoj d-rino Flora Szabo-Felsô kaj ing. Petâr Todorov. Prof. d-ro Otto Haszpra (Hungario) pledis pri la tezo „Ĉu Esperanto en universitatoj aŭ postdiplomaj kursoj?“, kies aktualeco estas aparte grava por la nuntempa disvastigo de la Internacia Lingvo.


En la fina kunsido de la Internacia Seminario de Fakuloj oni unuanime akceptis dokumenton pri la sukcesa kaj altnivela laboro, kiu pasis ĉe perfekta organizo, bonegaj labor- kaj loĝ-kondiĉoj.

Ing. Petâr TODOROV

EN LA NOMO DE HOMA SANO

(25 jarojn Medicinista Sekcio ĉe BEA)

La Dua Nacia Medicinista E-Konferenco „Zamenhofaj Tagoj“, dediĉita al la 25-jariĝo de la Medicinista Sekcio ĉe BEA kaj al la 100-jara jubileo de Georgi Dimitrov, okazis la 27-an kaj 28-an de novembro pasintjare en urbo Loveĉ. Ĝian laboron partoprenis ĉirkaŭ 160 geesperantistoj el la tuta lando kaj gastoj el Jugoslavio.



Petăr Todorov, vicprezidanto de BEA, kore salutas prof. Kiril Popov, prezidanton de la Medicinista Sekcio ĉe BEA, okaze de ĝia 25-jara jubileo.

La konferencon en la nomo de BEA salutis ĝia vicprezidanto Petăr Todorov. Li parolis pri la tre bonaj rezultoj, kiujn atingis la esperantistoj-medicinistoj.

La konferencon salutis ankaŭ Cecka Ivanova — sekretariino de la Distrikta Konsilantaro de Patrolanda Fronto en Loveĉ kaj prezidantino de la Distrikta Komitato de la Movado de Bulgaraj Virinoj, kaj d-ro Georgi Săbĉev — direktoro de Direkcio „Popola Sano“ ĉe la Distrikta Popola Konsilantaro.

Pro liaj grandaj meritoj kiel longjara E-aktivulo, per la Honora Insigno de BEA estis distingita d-ro Stojan Moraresku. Esperantisto de 1924, li propagandis la ideojn de Esperanto dum pluraj jaroj. Kune kun d-ro

Todor Todorov kaj d-ro Stefan Kadiev, d-ro Moraresku estas unu el la fondintoj de la Medicinista Sekcio kaj ĝia konstanta sekretario.

Pro ilia aktiva E-agado estis distingitaj ankaŭ la prezidanto de la Medicinista Sekcio prof. Kiril Popov — per la Ora Insigno de BEA, kaj d-ro Tjuran Omer el Loveĉ — per la Arĝenta Insigno de BEA.

La kolektivan raporton „25 jarojn Medicinista Esperantista Sekcio“ de prof. Kiril Popov kaj d-ro Stojan Moraresku legis d-ro Moraresku.

Kun intereso oni akceptis la raporton de d-ro Maria Lukanova „Georgi Dimitrov pri Esperanto kaj pri la sanprotektado“.

Prof. Kiril Popov rakontis pri la medicinaj problemoj, diskutitaj dum la 67-a UEA-Kongreso en Antverpeno.

La kandidato de medicinaj sciencoj, docento Ignat Ignev, prezidanto de la Distrikta Komitato de la Profesia Unuiĝo de Medicinistoj — ĉefkuracisto de la Psikiatria Hospitalo en Loveĉ, faris raporton pri temo: „Niaj klinikaj observoj sur la skizofrenio“. D-ro Konstantin Meĉkov legis la raporton „Psiko kaj medicino — agadkampo por ĉiu medicinisto“. La raporto de Neli Abaĝieva estis titolita: „La Granda Oktobra Socialisma Revolucio, la partopreno de d-ro Vasil Gerov en la okupo de la Vintra Palaco kaj lia renkontiĝo kun Lenin“.

Sciencan sciigon „La ergonomio en la distrikto de Veliko Târnovo“ faris la neŭrologo d-ro Vavrek (Generala Labor-Eksperta Kuracista Komisiono en Veliko Târnovo), kaj d-ro Marin Marinov raportis pri „Malpurigo de la akvofontoj per industrie uzitaj akvoj“. Inĝ. Maria Taŝeva informis la ĉeestantojn pri „La loko de kemiisto en la klinika laboratorio“. La sekretariino de DE de BEA en Loveĉ kaj prezidantino de la Medicinista E-societo „D-ro Zamenhof“ d-ro Tjuran Omer faris sciencan sciigon „Iuj niaj observoj konekse kun la neŭrozoj“. La konkludan raporton „El la historio de la medicino sur nia teritorio de plej antikva tempo ĝis la liberigo de Bulgario elsub la otomana jugo“ legis Neli Abaĝieva.

Dum la konferenco estis diskutitaj ankaŭ iuj organizaj problemoj.

La Dua Medicinista E-Konferenco pasis sub la devizo „Por paco kaj amikeco inter la homoj, ĉio en la nomo de la homo, ĉio por la homa sano“.

Neli ABAGIEVA

23^o Septembro

VERKISTO-KOMUNISTO

Krum Kjuljajkov (1893—1955) estas elstara bulgara verkisto, pentristo kaj publicisto. Li naskiĝis en Kjustendil, finstudis la Pentran Lernejon (1911—1919) en Sofio kaj ekde 1918 estas membro de Bulgara Komunista Partio.

La verkado de Kjuljajkov koincidas kun streĉaj momentoj en la politika historio de Bulgario kaj estas nedisigeble ligita kun la taskoj kaj agado de BKP. La aŭtoro komencis publikigi versojn kaj humursatiran prozon en 1915 en gazeto „Smjahi“ (Rido). Dum la aŭtuno de 1919 li kune kun Ĥristo Jasenov redaktis gazeton „Cerven smjahi“ (Ruĝa Rido) kaj kune kun T. Izmirlijev — gazeton „Zvānar“ (Sonorigisto) ekde 1923 ĝis februaro de 1925. Komencinte kiel humoristo, Kjuljajkov poste elstaris kiel aŭtoro kun tre vastaj intereso — poeto, beletristo, dramverkisto, publicisto kaj kritikisto. Li estis pentristo kaj aktiva ŝatanto de la artoj.

La verkaro de Krum Kjuljajkov karakterizigas per hela publicista patoso, per heroa optimisma sublimeco. Ĉefan lokon okupas verkoj, kiuj spegulas la Septembran Ribelon en 1923, la heroan sintenon de Georgi Dimitrov dum la Lejpciga Proceso, la vivon de la sovetaj homoj ĉe la kondiĉoj de libera socialisma socio. Atentokaptaj estas liaj versaĵoj, en kiuj la balada bildeco estas kombinita per popolkantaj tonoj — „Nikodim“, „Mortpafo“ k. a.

En la verkoj de Kjuljajkov post la 9-a de septembro 1944 gravan lokon okupas la dramo, per kiu li turnas la atenton de la bulgara teatro al nuntempa temaro, ligita kun la ideoj de la nova socialisma socio en Bulgario.



MORTPAFO

Estis frida kaj argenta
frumateno super mont'.
Sub glacio pur' torenta
ploris kvazaŭ dum la song'.

Antaŭ elfosita kavo
kondamnitoj staras du.
Ili antaŭ la mortpafo
signis per okula blu'.

Ĉiu rigardet' kristala
brilis kiel sunradi'.
Kion diris okulparo
ne komprenis la murdist'.

Antaŭ la kelkopa pafu
super preparita tomb',
ili ambaŭ kriis trafe:
— Vivu, vivu Dimitrov! ...

Paf'! Kaj falis en la tombon
trapafitaj korpoj du.
Etendiĝis peza ombro
de soldatoj en okul'.

En animoj de l'soldatoj
time tremis ama pov'
kaj ripetis korobatoj
tre mallaŭte: „Dimitrov!“ ...

Estis frida kaj argenta
frumateno super mont'.
Sub glacio pur' torenta
ploras kvazaŭ dum la song'

Krum KJULJAVKOV

Tradukis: Canko MURGIN

TITANO DE LA NACIA REVOLUCIO

„Mi dediĉis min al la Patrolando por servi al ĝi ĝis la morto mem kaj por labori laŭ la popola volo...“

Vasil Levski



Vasil Levski! Enhavoriĉa vivo, giganta energio, neripetebla majesteco de la popola nacia genio — sen lia nomo kaj sen lia revolucia faro la historio de Bulgario estus malpli riĉa.

Levski posedis talenton de organizanto, grandegan laboremon, firmam volon kaj oferpretecon. Multnombraj estas la fidelaj kaj abnegaciaj funkciuloj de la bulgara liberiga batalo, sed neniu alia krom li tiel konscie direktis ĉiujn siajn fortojn al la celo komprenigi al la bulgaroj, ke ili devas apogi sin antaŭ ĉio sur siaj propraj fortoj, ke la bulgaraj revoluciuloj devas agi sur sia patrolanda bulgara tero, inter tiuj, kiuj verŝos sian sangon, kies domoj forbrulos kaj kiuj, kiam morgaŭ renaskiĝos la libero, ĝuos la fruktojn de la dolĉa popola venko!

Ĉiu bulgaro portas en sia brusto parteton de lia spiritforto, de lia granda kredo: „... Se mi gajnos, gajnos la tuta popolo, se mi perdos, mi pereigos nur min mem.“

Tial lia legenda nomo vivis kaj vivos eterne en la bulgara tero, en la nacia memoro de la bulgaroj.

LEVSKI ANTAŬ LA JUĜANTARO

La 9-an de januaro (22-an de januaro laŭ nova stilo), en soldata mantelo, kun bandagigitaj kapo kaj mano, Levski starigis antaŭ la sultana juĝantaro, kie la prezidanto Said paŝao demandis kaj li respondis:

— Via nomo?

— Vasil Ivanov, oni nomas min same diakono Levski.

— Ĉu vi konas tiujn ĉi homojn? — demandis Said paŝao, prezentante al Levski fotografaĵojn de Karavelov, Rakovski, Haĝi Dimitar, Stefan Karaĝa, Dimitar Obŝti, Angel Kanchev k. a.

— Mi konas ĉiujn kaj neniun — respondis Levski.

— Kion vi volas per tio diri?

— Mi volas diri, ke mi konas neniun el ili.

— Dum sep jaroj vi vagadis tra urboj kaj vilaĝoj, ĉu povas esti, ke vi konas neniun?

— La apartaj personoj por mi ne estas gravaj, tial mi konas neniun.

— Diru, kio laŭ via opinio estas plej grava?

— La agado de la Provizora Registaro.

— Kiaj estas la taskoj de la Provizora Registaro?

— Legu ĝian statuton.

— Laŭ kies ordono okazis la politikaj mortigoj?

— Laŭ mia propra ordono.

— Kiu plenumis viajn ordonojn?

— La difinitaj por tiu ĉi celo homoj.

— Kiuj estas ili?

— Mi ne konas ilin.

— De kiu vi aĉetis la armilojn?

— De la komercisto, kiu vendis ilin.

— Kie loĝas tiu ĉi komercisto?

— Mi ne scias.

— Per kiaj rimedoj vi aĉetis la armilojn?

— Per mono de la komitato.

— Kiu donis al vi tiun ĉi monon?

— Ĉiuj kaj neniu.

— Kie troviĝas la Provizora Registaro?

— Ĉie kaj nenie.

— Certe vi ne estas kontenta pri la ekleziaj rajtoj kaj liberoj, kiujn la sultano donis per dekreto al la bulgaroj, se vi elektis la vojon de la ribelo?

— La donitaj ekleziaj rajtoj havas la valoron de azena ombro! Sub tiu ĉi ombro povas esti feliĉaj nur la maljunuloj kaj la ĉorbaĝioj*. Ni junuloj bezonas politikajn rajtojn kaj liberojn, kaj sen ribelo tiujn ĉi rajtojn oni ne povas akiri.

— La ribelo multajn homojn pereigos — sin aŭdigis sinjoro Penĉoviĉ.

— Kaj ĉu ankaŭ sen ribelo malmultaj homoj pereas sub la hakiloj de la agaoj?

— Ĉu vi ne pentas pro la faritaj politikaj mortigoj?

— Tiom, kiom pentas la agaoj, kiuj murdas la sklavigitajn bulgarojn por sia propra plezuro!...

— Ĉu vi konfesas vin kulpa?
 — Tiom, kiom la juĝistoj konfesas sin kulpaj, kiam ili kondamnas iun al morto kaj ordonas al la policianoj pendigi aŭ buĉi lin per hakilo. ..
 — Ĉu vi ne petas indulgon kaj pardonon de la sultano?

— Indulgon mi de neniuj volas!
 De la 15-a de januaro ĝis la 5-a de februaro (30-a de januaro — 18-a de februaro laŭ la nova stilo) Levski restis en la malliberejo, zorgoplena pri la sorto de Bulgario. Li kelkfoje frapis sian malobeeman kapon kontraŭ

la ŝtonmurojn por sin mortigi, kaj la 6-an de februaro (19-an de februaro) 1873 posttagmeze la turkoj alkroĉis lian duonmortan korpon al la pendigilo, sur la sama loko, kie nun situas la kavaleriaj kazernoj en la ĉefurbo de libera Bulgario.

(Laŭ rakonto de Stojan Zaimov, el la kolekto „Levski en la rememoroj de liaj samtempuloj“)

* Corbaĝio — bulgara riĉulo el la epoko de la osmana jugo.

MEMORE AL NIKOLA BOTUŜEV



Nedelĉo Ganĉovski rakontas siajn rememorojn pri Nikola Botuŝev

Foto: Emilia Kirilova

La 1-an de decembro pasintjara la regiona E-societo „Nikola Botuŝev“, la Regiona Komitato de la Aktivaj Batalantoj kontraŭ Faŝismo kaj Kapitalismo, la Regiona Komitato de Patrolanda Fronto kaj Modela Popola Kulturdomo „Liljana Dimitrova“ organizis vesperon, dediĉitan al la 41-a datreveno de l'heroa perejo de la kontraŭfaŝisto-esperantisto Nikola Botuŝev. La solenaĵon ĉeestis la sekretario de la Regiona Komitato de Bulgara Komunista Partio k-do Kojĉev, la aŭtoro de libro pri Nikola Botuŝev

Nedelĉo Ganĉovski, la honora prezidanto de MEM Nikola Aleksiev kaj reprezentantoj de la organizadoj-iniciatintoj de la memoriga vespero — Georgi Kovaĉki, Nedelka Ase nova, d-ro Marin Balĉev kaj Penka Modeva. Rememorojn pri Nikola Botuŝev rakontis Nedelĉo Ganĉovski. Nikola Botuŝev estis fidela filo de la bulgara laborista klaso, flama oratoro kaj revoluciulo, dediĉinta sian vivon al la batalo por homa feliĉo. Kiel funkciulo de la Bulgara Komunista Partio li estis plurfoje ĵetata en la faŝistajn malliberejojn. Unu el la organizantoj de la anti-faŝistaj armitaj batalgrupoj en Sofio, sabotantaj la produktadon de provizoj por la germana faŝista armeo, pro denuncio de provokulo li estis arestita kaj post longaj inkvizicioj mortkondamnita. Je la 15-a de novembro 1941 oni pendigis lin en la Centra Sofia Malliberejo.

Ankaŭ Nikola Aleksiev rakontis pri la revolucia vojo de Nikola Botuŝev, pri lia brila ekzemplo de esperantisto-revoluciulo, kiu testamentis al ni sian senliman fidelecon al la plej humana ideo — liberigo de la homaro el la kapitalisma kaj faŝisma sklaveco. La multnombraj ĉeestantoj varme aplaudis la oratorojn.

Literaturan-muzikan programon plenumis lernantoj el lernejo „Nikola Botuŝev“, kiuj sin prezentis per deklamaĵoj, kaj la E-horo ĉe la Esperanta Kultura Centro „M. Gorkij“.

Per tiu ĉi aranĝo la nove fondita E-societo „Nikola Botuŝev“ komencis la plenumon de sia ampleksa programo por propagando de Esperanto en lernejoj, oficejoj kaj aliaj sociaj organizadoj.

D-ro Marin BALĈEV



LI ESTIS ĈIAM EN LA UNUAJ VICOJ...

Lian nomon oni ĉiujare povis vidi sur la „Verda Tabulo“ de „Bulgara Esperantisto“ inter niaj plej agemaj kaj ardaĵ kunlaborantoj kaj veraj disvastigantoj de la E-gazetaro.

Tute subite atingis nin nekredebla novaĵo: **Dimitar Ivanov** ne plu vivas! Kun profunda doloro niaj samideanoj el Plovdiv sciigis al ni pri lia morto. Forlasis niajn vicojn tiu, kiu ĉiam estis inter la unuaj!...

Dimitar Ivanov naskiĝis la 25-an de junio 1922 en Plovdiv en laborista familio. Pro manko de monrimedoj, finite la kvaran klason, li komencas labori en fabriko.

En 1938 li jam estas laboristo en presejo en Plovdiv kaj ĝuas la fidon de siaj pli maljunaj kolegoj. En la aŭtuno de la sama jaro Dimitar eniras la vicojn de RMS (Laborista Junulara Unuiĝo) kaj disvastigas markojn por monhelpo al la Bulgara Komunista Partio.

Dimitar Ivanov esperantistiĝas en 1939 dank' al Ivan Bataklijev — tiama prezidanto de E-societo „Kulturo“. Li helpis la agadon de nelegalaj aktivuloj de la partio por realigo de kontraŭfaŝistaj operacioj: havigis al ili municiojn, literojn kaj paperon por nelegala stencilpresejo, partoprenis partiajn kunvenojn, kaŝe aŭskultis kaj disvastigadis la bultenon


de la „Soveta Informburoo“, elsendatan de Radio Moskvo, pri la vera situacio sur la Orienta Fronto. Pro denuncio al la polico, amikoj avertas lin ŝanĝi sian loĝejon kaj li forlasis Plovdiv kaj forveturas al Sofio ĉe sia patro. Tie li konatiĝas kun esperantistoj kaj estiĝas membro de la kvartala popola legejo „Probuda“ (Vekiĝo). Dimitar Ivanov komencas kunlabori per diversaj informoj al la ĉefurba progresema gazeto „Zarja“ (Aŭroro).

En aŭgusto 1944 la stabo de Dua Rodopa Partizana Brigado, pere de sia reprezentanto Kostadin Janev starigas al Dimitar Ivanov la respondecan taskon trovi kaj disponigi al la brigado la necesajn materialojn por organizo de provizora presejo por eldonado de la partizana gazeto „Ribelula Batalo“. Tiun ĉi taskon D. Ivanov prenumas bonege — li organizas la presejon en speciale preparita por tiu celoejo en vilaĝo Izbegli, regiono de Asenovgrad. Tie li starigas kontakton kun la politika komisararo de la partizana brigado Genko Gjulev.

Dimitar Ivanov aktive partoprenas en la kontraŭfaŝisma revolucio je la 9-a de septembro 1944, en la okupo de la policejo kaj la poŝtejo en Asenovgrad. Post la starigo de popola regpotenco en nia lando li partoprenas en la Patrolanda Milito kontraŭ Hitler-faŝista Germanio. Post la milito li estas komandanto de specialaj milicaj bataljonoj kaj helpas la naciigon de privataj fabrikoj. Ĝis 1951 D. Ivanov estas oficiro en la Popola Armeo kaj aktive partoprenas la kulturajn aranĝojn en sia regimento, ne forgesante Esperanton kaj la poresperantan agadon inter la soldatoj. Arda kaj sindona esperantisto, Dimitar Ivanov estis longjara aktivulo de la bulgara esperantista movado kaj senlaca kunlaboranto de E-societo „Kulturo“ en sia naskurbo Plovdiv, aganto por bulgara-soveta amikeco, por internacia interkompreniĝo pere de Esperanto. Pro lia fervora esperantista aktivado oni multfoje distingis lin per altaj distingoj de la Distrikta kaj Centra Estraroj de Bulgara Esperantista Asocio.

Fidela filo de la bulgara popolo, verva aktivulo de la Esperanto-movado, Dimitar Ivanov estas brila ekzemplo de patrioto kaj esperantisto-internaciisto kaj restos ĉiam viva en nia memoro.

D. SIMEONOV



INTERNACIA KONKURSO EN BUDAPEŝTO

ILEF ORGANIZAS INTERNACIAN FOTO-KINO-MAGNETOFON-KONKURSON

Lige kun la 68-a Universala Kongreso de Esperanto en Budapeŝto (Hungario) en 1983, la Internacia Ligo de Esperantistoj Foto-Kino-Magnetofon-amatoroj (ILEF) organizas internacian konkurson pri temo:

„LA FOLKLORA ARTO — PONTO INTER LA POPOLOJ“,

kiu estas konforma al la ĉefa kongresa temo pri komunikado.

ILEF alvokas ĉiujn esperantistojn foto-kino-magnetofon-amatorojn partopreni la konkurson en ĝiaj tri fakoj:

1) FOTO

Ĉiuj fotografiaj (nigre-blankaj aŭ koloraj) devas esti kopiitaj je standarda formato: 24×30 cm aŭ 40×50 cm kaj estu provizitaj per klariga teksto (subskribo). En aparta koverto, sur kiu devas esti skribita iu pseŭdonimo, la konkursantoj devas doni sian ĝustan nomon kaj adreson.

La bone pakitajn fotografiajn (inkluzive la koverton kun la donitaĵoj pri la sendinto, oni ekspedu al ing. HANS R. SCHMIDT) estrarano de ILEF pri fako „Foto“ — ne pli malfrue ol la 30-a de aprilo 1983. Lia adreso: Schweriner Allee 35, DDR-2800 LUDWIGSLUST/Meckl.

2) KINO

Ĉiuj kino-amatoroj povas partopreni la konkurson per nigrablankaj kaj koloraj 8 mm-super, 2×8 mm aŭ 16 mm filmoj, surbendigitaj aŭ kun aldone sinkronigitaj kun la

filmbildoj magnetofon-kasedoj aŭ bobenoj. La dezirantoj partopreni la film-konkurson persone kunportu en Budapeŝto siajn film-verkojn, kiujn oni projekcios dum la kongres-tagoj. ILEF disponigos projekcisonon kaj projekciatorojn. Speciala jurio pritaksos la film-kvalitojn surloke.

3) MAGNETOFONO

La kondiĉoj por partopreno en la konkurso per magnetofonaj surbendigoj de popolantoj, instrumentoj kaj muzikaj popolensembloj estas la samaj kiel por la konkursaĵoj pri fako „Kino“. Ĉiu deziranto konkursi havos la eblecon prezenti siajn magnetofon-surbendigojn antaŭ speciala jurio.

La plej altkvalitaj fotografiaj, filmoj kaj magnetofon-surbendigoj estos premiitaj respektive per I, II kaj III premioj.

La premioj estos aljuĝitaj fare de UEA kaj ILEF. Al ili aliĝas per modesta premio ankaŭ la Esperanto-Liceo en Madrido, Hispanio.

Al ĉiuj partoprenontoj en la internacia konkurso la estraro de ILEF deziras fruktodonan laboron kaj sukcesojn en Budapeŝto 1983!

Aliĝu ankaŭ vi al ILEF!

Per via membreco kaj aktiva kunlaborado vi helpas la pluan disvastigon de Esperanto pere de la plej modernaj rimedoj de informado kaj komunikado.

Ni atendas viajn kontribuiaĵojn!

La estraro de ILEF

LA DIFERENCO: KIAL TEJO?

Eble vi demandas vin, kio estas la diferenco inter la Tutmonda Esperantista Junulara Organizo kaj ĉiu alia internacia organizaĵo, kiu kunligas plurajn naciajn organizojn. Kial ne sufiĉas via aktiveco en la loka grupo, kaj kion pli povas TEJO doni al vi?

La respondo estas: MULTON! TEJO ne nur kunligas plurajn landajn sekciojn, ĝi estas por la junularo tio, kio UEA estas por la ĝenerala movado: LA KERNO.

TEJO donas al vi servojn en granda nombro kaj varieco: Pasporta Servo de TEJO estas la unika rimedo por malaltkoste vojaĝi kaj

konatiĝi kun personoj kaj tradicioj. Vi trovos senpagan gastigadon en dekoj da landoj en la tuta mondo.

La internaciaj kongresoj de TEJO havas internacian amikan etoson kian vi verŝajne nenie alie povos trovi, en kaj ekster la Esperantomovado. Individua membro de TEJO ĝuas konsiderindan rabaton por la aliĝkotizo!

Inter la eldonaĵoj de TEJO elstaras *Kontakto* — unu el la plej bonaj E-periodaĵoj, lingve kaj enhave.

(Eltraĵo el la Faldfolio de TEJO, enmetita en la Jarlibron de Esperanto, 1982)

GASTE AL ELI URBANOVA

„Esperanton oni foje nomas „Lingvo de poezio“. Per tiu ĉi lingvo oni povas esprimi ĉiujn animmovojn kaj emociojn. Krome, ĝi estas tre belsona“, respondis la poetino Eli Urbanova el Prago al mia demando ĉu arte kreita lingvo kapablas esprimi ĉiujn nuancojn de la homaj pensoj kaj sentoj. Kaj ŝi plene rajtas aserti tion, ĉar dum pluraj jaroj ŝi verkas poezion ĝuste en Esperanto. Sia verkaro donas konkretan respondon samtempe al du kategorioj de skeptikuloj: al tiuj, kiuj dubas pri la esprimpovo de tiu ĉi „artefarita“ lingvo, kaj ankaŭ al tiuj, kiuj opinias, ke

titolitan „Nur tri kolorojn“, aperigis en 1960 E-eldonejo „Stafeto“ en la Kanariaj Insuloj. Apartaj versaĵoj el tiu ĉi kolekto estas tradukitaj en kelkajn naciajn lingvojn, al aliaj oni adaptis melodiojn. La dua kolekto — „El subaj fontoj“, estas eldonita en 1981 de la Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Nun oni preparas la eldonon ankaŭ de tria kolekto.

Kiel vi komencis?

„Pri Esperanto mi unue eksciis el la rakonto de la fama ĉeĥa aktoro Karel Heger, apartenanta al la nombro de la plej elstaraj aktoroj-esperantistoj tutmondaj. Antaŭ la Dua Mondmilito li kunlaboris en la tiel nomata „Verda Radiostacio“ — emisio de la Ĉeĥa Radio en Esperanto. En tiuj ĉi emisioj li rekreis multajn heroojn el la ĉeĥa kaj monda dramaturgio.

Esperanton mi komencis lerni en 1948, kaj post iom malpli ol du jaroj mi verkis miajn unuajn versaĵojn en tiu ĉi lingvo. Ili aperis en internaciaj E-revuoj, kie ilin rimarkis la eminenta hungara poeto Julio Baghy, unu el la fondintoj de la tiel nomata Budapeŝta Skolo de esperanta poezio. Baghy estigis mia „instruisto je distanco“. Ni korespondis, kaj inter ni ekestis io pli ol ordinara amikaj rilatoj...“

En via verkaro superregas la intima liriko. Kiu estas la kaŭzo?

„Min ĉiam interesis la profundo de la homa animo: emociaj rilatoj, ekzisto de la amo, ĝiaj formoj. Kaj ĉar mia vivo mem estis riĉa je tre emociaj kaj ne trivialaj travivaĵoj, mi havis la fonton el kiu ĉerpi. Krome, Esperanto inspiras min verki lirikon pro sia belsoneco.“

Inter la diplomoj kaj premioj, per kiuj iam ne unufoje estis distingita via verkaro, estas ankaŭ internaciaj honordiplomoj por engaĝita poezio. Via rilato al ĝi?

„Guste Esperanto estas unu el la manieroj por proksimiĝo kaj interkompreniĝo de la homoj diverslingvaj, kaj la esperantistoj ĉiam subtenis kaj subtenas la ideon pri paca kunekzistado de la popoloj. Mi estas instruistino laŭprofesie. Do al la problemoj de la nuna tago mi esprimas mian starpunkton ne nur kiel poetino, sed ankaŭ kiel edukistino de la juna generacio.“

Adela KRATENOVA
(La artikolon havigis al „BE“
agentejo „ORBIS“, Ĉeĥoslovakio)



La ĉeĥa poetino-esperantistino Eli Urbanova

Foto: Milan Bednařík, ORBIS

la poezio estas agadsfero, konvena nur por viroj.

En la mondo efektive ne estas multaj poetinoj kaj la poetinojn-esperantistinojn oni povus nombri per la fingroj nur de unu mano. Eli Urbanova, naskiĝinta en Ĉeĥoslovakio en 1922, apartenas al la nombro de la plej famaj kaj talentaj inter ili. Ŝi estas aŭtorino de multnombraj versaĵoj, publikigitaj en E-periodaĵoj en la tuta mondo, kaj ankaŭ de du tre bonaj verskolektoj. La unuan el ili,

BARKAROLO

Silentas la maro dormanta,
karese sonas barkarol';
sur ondoj kun paro amanta
balance naĝas la gondol'.

Ĉirkaŭe nur akvo helblua —
tre sorĉa, rava panoram';
aperis la stelo unua,
avizo grava de la am'.

Sulkigas jen ondo post ondo
kaj ĉiun sekvas dolĉa kis'
kaj ardas la ĵuroj; la mondo
fabela ŝajnas paradiz'.

La nokto de l'amo jam pasas,
sin laste kisas juna par',
la steloj ĉielon forlasas,
la ĵuroj — dronas en la mar'.

Eli URBANOVA

(Revuo Esperanto Internacia, 1952, n. 162)

AL ĈIUJ ESPERANTISTOJ DE LA MONDO

Estimataj samideanoj!

Nia E-klubo organizas Tutmondan Esperantan Korespondmarŝon sub la slogano:

„Esperantistoj el la tuta mondo voĉdonas por plena malarmado, por paco kaj amikeco inter la popoloj!“

Ni sincere alvokas vin ĉiujn, komencantojn kaj eminentulojn, subteni nin.

Sendu al ni viajn leterojn kun la supre citita slogano, vian adreson, nomon, profesion, subskribon. Tio rilatas ankaŭ al la kolektivaj leteroj. Via letero estos registrita kaj poste transdonita al la Tutmonda Packonsilantaro por konvena proklamado.

Se iu pro iu kaŭzo ne povas doni adreson, do li skribu nur sian nomon kaj la nomon de sia lando.

DEMIDJUK Dmitrij Nikolaevič,
prezidanto de E-klubo „Dnipro“,
315300 Kremenčug, Poltavskoj obl.,
Cent. p. j. 27, Sovetunio

DE KIE VENAS MINACO KONTRAŬ PACO?

La Armea Eldonejo de la Ministerio pri Defendo de USSR eldonis ruse, angle, france, hispane kaj itale la libron „De kie venas minaco kontraŭ paco“.

La libro, preparita de kompetentaj sovetaj organoj, enhavas aŭtoritatajn donitaĵojn, inter ili ankaŭ komparojn, kiuj donas eblon al la legantoj ricevi objektivan imagon pri tio, kiel efektive aspektas la bilanco de la militfortoj inter Oriento kaj Okcidento. (Telegrafa Agentejo da Sovetunio (TASS) — el la gazeto „MOSCOW NEWS“, n-ro 10, 1982)

KONTRAŬMILITA BILDSTRIA ROMANO



La jaro 1945 ne estas facila por la familio Nakaoka. Regas ĝenerala malsato. La najbaroj rifuzas plu helpi al la familio pro la skandale malpatriotisma konduto de la patro. La antaŭlasta el liaj kvin gefiloj, la ruza petolema knabo Gen, dividas kun la patro ties kontraŭmilitismon. Antaŭ la fino de ĉi tiu volumo (la unua el jam sep en la japana) la amara sperto hardas la primitivajn opiniojn de Gen, ĉar familio Nakaoka loĝas en Hiroŝimo.

Ne temas nur pri Gen. La leganto konatiĝas kun ĉiu familiano kaj ankaŭ kun kelkaj aliaj, sed ĉefe kun la japana socio tiutempa, kun la reganta spirito de sinmortige fanatika adoro por apenaŭ konata imperiestro.

Mem perdinte familianojn en la hiroŝima hekatombo, Nakazawa verkas unuavice por japanoj, por ilin eduki kontraŭ ĉia ajn militfervoro, kaj sekve kritikas ekskluzive (almenaŭ ĉi-volume) la japanan socion. La mesaĝo tamen restas universala.

La traduko estas konciza kaj suka, kun viveca, natura dialogo kaj lerte elektitaj onomatopoeoj. Ĉefa inter la tre malmultaj misaĵoj estas la esprimo „voki iun perfidulo“ (anst. „nomi...“).

Al gratulo al Rondo Gen pro konsciencie farita laboro devas aldoniĝi espero, ke la esperantistoj povu ankaŭ konatiĝi kun la plua historio de Gen kaj de tiuj liaj familianoj, kiuj postvivis la atombombon.

Charles R. L. Power
(El „Esperanto“, n-ro 113, 1982)

Nudpieda Gen (1973), de Keizi Nakazawa. El la japana tradukis Yukio Izumi (1959). Tokio: Rondo Gen, 1982. 4 + 284p. Ilus. de la aŭtoro. 21 cm. Prezo: 30.00 guldenoj (ĉe la Libroservo de UEA).

Lingvaj problemoj

PRI STILO

La verkanto devas ĉiam pensi, ke lia nobla tasko estas *servi* la ceterajn homojn per siaj skribaĵoj. Tial li devas nepre klopodi por eviti al la leganto senutilan penon. Li devas ĉion fari por prezenti siajn ideojn en kiel eble plej alloga, ripoziga kaj ĉarma stilo, neniam halti en sia pliperfektiga pensado, kredante ke li atingis la idealon. Lia celo kompreneble ne devas esti malsprite flati la leganton kaj eviti al li ĉiun okazon de pripensado. Male li devas inciti lin al pensado, sed al pensado pri la ideoj esprimitaj kaj ne al laciga kaprompado nur por kompreni la sencon de l' frazoj...

Estas por ni duobla tasko. En niaj verkaĵoj ni ĉiam pli kaj pli respektu la rajton de la le-

ganto kaj klopodu lin plezurigi per kiel eble plej diafana kaj flua stilo, kiel bela pura rivero de niaj ideoj. En niaj lernolibroj ni helpu la lernantojn forgesi pro Esperanto sian nacilingvan stilon kaj ni kutimigu ilin je la Esperanta „spirito de la lingvo“ kaj la malsama vortarango, por ke ili ne estu ĉiumomente embarasataj, legante Esperantajn verkaĵojn. Tiuj du ŝajne kontraŭaj taskoj kondukas al la sama dezirita rezultato. Verkantoj kaj lernantoj la plej bonan instruadon trovos en ĉiam pli ofta legado. Ni legu kaj ni relegu! Jen nia nepra bezono. El sperto ni ĉiuj gajnos la konstantan zorgon kaj necesan amon al klareco, kiu restu diino de la lingvo.

Edmond PRIVAT
(„Amerika Esperantisto“, aprilo 1911)

KIEL AKIRI BONAN ESPERANTO-STILON

La du ĉefaj elementoj de bona stilo estas komunaj al ĉiuj lingvoj. Unue, oni ne nomas bonstila verkmanieron, kiu ne montras ian originalecon. La temo mem povas esti tre konata. En la verkoj de la glora Shakespeare malnovaj temoj ofte aperas. Sed ili aperas en originalaj vestoj, kiuj donas al ili la ĉarmon de io tute nova. Due, por meriti ke oni rigardu lin kiel stiliston, la verkanto devas krei la efikon, kiun li intencis. Tion li kapablas nur se li precizigas al si iun celotan efikon kaj scias ĝin atingi per uzo de plej konvena lingvo. Plue, ne sufiĉas bone difini la celon kaj plene atingi ĝin: se la celo estas triviala aŭ banala, la rezultato ne povas esti vere bonstila.

Inter la subordaj ecoj de bonstila lingvo troviĝas jenaj: kompreneblo, simpla, vortŝparo, harmonio, kaj en Esperanta verkado internacieco. Figura lingvo ofte faras tre plaĉan impreson, precipe en poemoj, sed pri Esperanto-verkoj nur kondiĉe ke ĝi estu internacie komprenebla. Kiu volas atingi bonan stilon, bezonas atentege verki por eviti gramatikajn erarojn kaj incitajn apartaĵojn.

Tial ke bona stilo konsistas el feliĉa vortarango, vortoj meritas apartan konsideron. Verkanton, kiu senzorge uzas vortojn, oni ne povas esti. Vortoj devas esti uzataj laŭ sia ĝusta senco, kaj tiamaniere ke ili ekzakte esprimas ideojn. Ĉe verkado en Esperanto oni devus preskaŭ ĉiam elekti oficialajn aŭ vaste aprobitajn radikojn; nur tute

apartaj cirkonstancoj pravigas enkondukon de neologismo aŭ nacilingva vorto. Esperanto posedas iom malgrandan radikaron. Pro tio estas nature fari al si kunmetaĵojn; cetere kunmetaĵoj dotas stilon per energio kaj koncizo. Sed la kunmetaĵoj ne estu pezaj, malbelaj, kontraŭlogikaj aŭ cerbumigaj. La verkanto evitu trouzon de vortoj longaj. Plej bone estas kutime elekti mallongajn vortojn, sed uzi longajn nur por atingi specialan efikon. Lingvo-diverso estas per ĉiuj rimedoj celinda; tiurilate necesas sin gardi kontraŭ la sibleco de Esperanto. La sufikso „um“ kaj la prepozicio „je“ pro sia nedefiniteco, devus esti uzataj kiel eble plej malmulte.

Ankaŭ bona konstruo de frazoj multe kontribuas al stilo. Sukcesdona metodo estas plej ofte aranĝi vortojn laŭ iu natura ordo — ekzemple, subjekto-verbo-komplemento, kaj adverbo-verbo. Tion farante, la verkanto povas laŭvole krei efekton per nura rompo de sia regulo. Kiel ĉe elekto de vortoj, tiel same ĉe konstruo de frazoj, diverso multe valoras. Ofte ripetataj grupoj, kaj adjektivo + substantivo kaj adverbo + verbo tudas la leganton. Pli-malpli egale lin tudas trovi samrolan vortan regule staranta ĉe la komenco de frazoj. Alia grava afero estas diferencigi frazojn laŭ longo. Krom en kelkaj cirkonstancoj, serio de mallongaj frazoj aŭ — eĉ pli — serio de longaj frazoj malagrabla impresas; kaj plej malagrabla impresas senrompa enfluo de tre longaj kaj tre komplikaj frazoj.

Cio ĉi estas nur priskriba, analiza. Ĉu ne ekzistas iaj modeloj? Certe jes! En la Esperanta literaturo aparte honora loko estas okupita de la brila triopo: Zamenhof, Grabowski kaj Kabe. Tiuj tri klasikuloj liveras normojn, laŭ kiuj juĝi la ceterajn verkistojn,

kun la ebla escepto de la plej talentaj el ili. Ĉar alte talenta verkisto ne bezonas modelojn. Lia genio kreas propran, memstaran stilon.

LAMOND

(*Revuo Esperanto Internacia*, 1953, p. 136—139)

EL LA GAZETARO

Gazeto „Heroldo de Esperanto“ (n-ro 13/1982) surbaze de materialoj en „BE“ koncize informas:

- „La revuo „Bulgara Esperantisto“ aperigis dupaĝan raporton pri la enkonduko, antaŭ unu jaro, de Esperanto kiel fakultativa lernobjekto en la bulgarajn mezlernejojn. Du instruistoj el Sofio detaligas siajn spertojn rilate la lernojaron 1981/1982. Krome, ok lernantinoj respondas al improvizita, sed plej trafa enketo kun precizaj demandoj, ekz.: Kial vi enskribiĝis por lerni la Internacian Lingvon? Kiel vi progresas en Esperanto kompare kun lernado de aliaj fremdaj lingvoj? Kia estas la opinio de viaj geamikoj kaj parencoj?“
- „Esperanto-kursoj por komencantoj kaj instruistoj funkcias en bulgaraj lernejoj, i. a. en Preslav, Sumen kaj ĉe la Supera Medicina Instituto en Varna.“
- „Verda Raketo“ estas la unua en Bulgario lernejana Esperanto-societo: en majo ĝi festis la 20-an datrevenon de la fondiĝo. La societo, kiun gvidas ĝia fondinto Bojĉo Mladenov, havas nun tre riĉan Esperantan reklamaron: 5 000 000 alumetskatolojn, 60 000 glumarkojn, 10 000 plastikajn sakojn, 10 000 kovertojn, 5 000 kalendaretojn, 3 000 insignojn kaj mil sportajn bluzetojn; ĉio kun tiu ĉi emblemo.“

BULGARA RAKONTO

La bulteno „Heleco“, organo de Astura Esperanto-Asocio en Gijon, Hispanio, en n-ro 26/1982 publikigis la rakonton „Unu el „Epopo de la forgesitaj“, kontribuado de nia samlandanino Bojana Prodanova el Gabrovo, en kiu ŝi rakontas la tragikan historion de unu el la multnombraj herooj de la Aprila Ribelo en 1876 kontraŭ la osmana jugo.

En la sama numero de „Heleco“ estas publikigita informo sub la titolo „Hispana poeto ricevis bulgaran ordenon“. Temas pri s-ro Manuel Muños Hidalgo, distingita per la ordeno „Cirilo kaj Metodo“ — unua grado, pro liaj meritoj en la kultura interŝanĝo inter Hispanio kaj Bulgario. Li estas la unua tradukisto en la kastiljan lingvon de verkoj de la bulgara poeto Nikola Vapcarov.

ĈU ESTAS GEESPERANTISTOJ EN BULGARIO?

Al tiu ĉi demando de Victorio Leon el Kubo, de Polina Levĉenko el Sovetunio kaj de Lee Chi Men el Kowloon, Hong-Kong, respondas la veterano de la bulgara kaj internacia Esperanto-movado Nikola Aleksiev sur la paĝoj de revuo „Bulgarie d'Aujourd'hui“ — franclingva eldono, n-ro 11/1982, de Agentejo „Sofia-Pres“, Bulgario. Liaj respondoj estas pozitivaj kaj prezentas detalan rakonton pri la penetro de Esperanto en Bulgaron preskaŭ tuj post la publikigo de la unua lernolibro de Esperanto en rusa lingvo en 1877 kaj pri la ĝisnuna disvastigo de la lingvo en nia lando. La aŭtoro substrekas la aŭtoritaton de Esperanto en Bulgario kaj la noblan agadon de la bulgaraj esperantistoj, kiuj aktive partoprenis la batalon kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo en Bulgario kaj en la socialisma konstruado en nia lando.

POLITIKA AGANTO, JURNALISTO KAJ ELSTARA PEDAGOGO

Sub tiu ĉi titolo gazeto „Rabotniĉesko Delo“, organo de la Bulgara Komunista Partio, en sia n-ro de 11.II.1982 publikigis artikolon de Vasil Palankovski, dediĉitan al la memoro de la antaŭ nelonge forpasinta elstara bulgara esperantisto, prezidanto de la Instruista Sekcio ĉe BEA Vasil Bozarov. La aŭtoro detale priskribas la vivon kaj la meritojn de Vasil Bozarov — fidela aganto de BKP, aktiva batalanto kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo kaj arda propagandanto de Esperanto en nia lando. Kiel multjara popola instruisto kaj pedagogo, post la venko de la socialisma revolucio en Bulgario, li multe kontribuis por la reorganizado de la kleriga afero kaj por la enkonduko de Esperanto en la IX kaj X klasojn de la mezlernejoj en nia lando.

1983 — INTERNACIA JARO DE KOMUNIKADO

La mesaĝo de la prezidanto de UEA, s-ro Grégoire Meartens, en kiu li emfazas la gravecon de niaj preparoj por la Internacia Jaro de Komunikado, estas instigilo por ni ĉiuj, enhavas tre utilajn konsilojn.

Generale, la komunikado mem estas ankoraŭ subtaksata kaj la rolo de la Internacia Lingvo en ĝi despli.

Preparante nin por diversspecaj diskutoj, ni devas unuigi en la nocioj kaj metodoj.

Kio estas komunikado?

— reciproka kontaktado, informado, homa kunekzistado;

— gravega ero de la paco;

— necesajo por la scienca progreso;

— nepraĵo por la amikeco kaj la interkompreniĝo de la homoj kaj popoloj.

Kiel konate, dum la tuta homa historio, ĉiu progreso en komunikado estis ĉiam aŭ kaŭzo aŭ kunaganto de nova epoko (parolkapablo de la homo, skribo, tipografio, telekomunikado). Nun ni venas al la ĝis nun lasta ŝtupo: al la interlingvo.

Ofte ni fieras, ke ni vivas en la epoko de scienco kaj teĥniko. Sed vidu: post preskaŭ 200 jaroj de internacia uzado de metra sistemo, en kelkaj landoj oni ankoraŭ kalkulas kaj mezuras per diversaj mejloj, berejoj, uncoj, diversaj coloj ktp.

La Unuigintaj Nacioj, UNESCO, per sia decido proklami la jaron 1983 Internacia Jaro de Komunikado montris, ke la komunikado estas vere unu el la bazaj bezonoj por plua evoluo. Samtempe ni povas varme saluti tiun ĉi decidon, ĉar ĝi pravigas niajn stre-

badojn pri faciligo de interhomaj kontaktoj, ĝi donas al ni nerektan subtenon. La jaro 1983 estas vere konvena preparo por la jaro 1987, proklamota kiel Internacia Jaro de la Internacia Lingvo.

Kaj denove, kiomfoje jam, ni venas al la demando pri informado. Estas grandparte nia kulpo, ke la publiko scias malmulton pri Esperanto; multaj personoj kaj institucioj ne estas malamikaj al ni, ili nur ne estas informitaj. Ni devas pacience informadi, mon-tradi sukcesojn kaj rezultojn.

Naciaj E-asocioj kaj grupoj devas eldonadi iuspecajn informilojn, entenantajn novaĵojn, kompilitajn el raportoj de lokaj grupoj, komisionoj aŭ sekcioj, el diversaj periodaĵoj kaj dissendadi ilin senpage al presagentejoj, junularaj, sciencaj aŭ turismaj centroj, ĵurnaloj ktp.

Plej grandan oportunecon donas al ni la eldonata en Bulgario oficiala presorgano de Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEJA) „Internacia Ĵurnalistoj“, al kiu ni devas kunlabori, ĉar ĝi disponigas al ni siajn pagojn por tiuj celoj.

Ni konsciiĝu, ke post dekoj da jaroj, denove nun, kaj ĝuste nun, prezentigas la historia ebleco: transpaŝi la sojlon. Ni **ne rajtas** (!) preterlasi la epokan okazon vigle aktivadi por la plej vasta propagando de la Internacia Lingvo, interesigi kiel eble plej vastajn mediojn de la socio pri ĝiaj valoroj kaj eblecoj por senpera interkompreniĝo de amasoj da homoj el plej diversaj partoj de la mondo.

D.S.Ĥ.

ABONU REVUON „KOLEKTANTO“!

Revuo „Kolektanto“ estas organo de la Sekcio de E-kolektantoj ĉe Bulgara Esperantista Asocio.

Ĝi enhavas plej diversspecajn materialojn: lingvajn ekzercojn, interesajn legaĵojn, artikolojn pri hobiaj, versaĵojn, kantojn, enigmojn, proverbojn, krucvort-enigmojn, artikolojn pri belarto, fotado ktp. La revuo zorgas pri la kolektado kaj kolektantoj — filatelistoj, filokartistoj, faleristoj kaj aliaj filolistoj.

En ĝi oni povas trovi adresojn por korespondado kaj interŝanĝo.

„Kolektanto“ aperas kvarfoje dum la jaro. Jarabono—

1,5 levoj. Por fremdlando — 2 levoj (2 usonaj dolaroj aŭ egalvaloro en okcidenteŭropa valuto) aŭ 10 respondkuponoj.

Adreso por abono:

BULGARIO, 1000-SOFIO, Str. Ĵdanov 5, DSK-konto 185/3081, revuo „KOLEKTANTO“.

Adreso de la redakcio (por leteroj):

Revuo „KOLEKTANTO“,

1303-Sofio, Bul. Ĥristo Botev 97, Bulgario.

Por ĉiuj 10 abonoj la peranto rajtas unu abonon senpage.

La redakcio de „KOLEKTANTO“

ZAMENHOFAJ VESPEROJ

SOFIO. Okaze de la 123-a datreveno de la naskiĝo de d-ro L. Zamenhof, la Sofia Esperantista Kulturcentro „M. Gorkij“ organizis la 15-an de decembro pasintjare celebradon de tiu karmemora datreveno per riĉa kaj originala kultura programo.

En la parolado de Belka Beleva estis substrekita la talento de Zamenhof kiel originala poeto kaj sperta tradukisto — modelo por esperantaj verkistoj kaj tradukistoj.

La programon partoprenis la plej novaj E-kursanoj — grupo da geaktoroj el la Nacia Junulara Teatro „Ljudmila Jivkova“. Hrisula Garidi recitis „Ho mia kor“ — la fama versaĵo de Zamenhof, en kiu la majstro dividas siajn emociojn kaj maltrankvilon pri la sorto de la Internacia Lingvo. La merita aktorino Conka Miteva kaj la aktorinoj Ljubka Coneva kaj Ginka Toteva tralegis la fabelon de Andersen „La novaj vestoj de la reĝo“. La merita aktorino Luna Davidova kaj la aktoroj Nikolaj Uzunov kaj Nikolaj Ivanov legis fragmentojn el „Hamleto“ de Shakespeare.

Versaĵoj de mondfamaj verkistoj (Goethe, Heine k. a.), tradukitaj de Zamenhof, eksonis en la plenumoj de la kantistinoj Maria Angelova, Karamfilka Adamova kaj Lili Dokova, kiuj interpretis Mozart, Schubert ka.

La publiko, ege kontenta, varme aplaudis la plenumantojn, esprimante sian pofundan kontentecon pri tiu vere bona Zamenhofa belarta aranĝo.

M. A.



Ĉu ankaŭ vi dancis je la balo de l'junaj sofiaj esperantistoj okaze de Zamenhof-datreveno?

Foto: Emilia Kirilova

PERNIK. Okaze de la 123-a datreveno de la naskiĝo de d-ro L. L. Zamenhof E-societo „Nova Vojo“ organizis literaturan-muzikan vesperon. Ĉeestis geesperantistoj el Pernik, Temelkovo kaj vilaĝo Ljulin.

La solenaĵon partoprenis ankaŭ gastoj el Sofio — la kantistoj Angelina Sotirova — soprano kaj Dimităr Denĉev — tenoro. Inter la aliaj plenumoj en Esperanto, ili kantis ankaŭ „Ho, mia kor“.

Interesan raporton pri la vivo de L. Zamenhof legis C. Zareva.

Kantgrupo de lernantoj el la lernejo en Temelkovo plenumis du kantojn en Esperanto. Post sia bona sinprezento en Pleven, Pernik kaj Banskò, la lernejana E-rondo ĉe lernejo „Kliment Ohridski“ en vilaĝo Ljulin prezentis muntaĵon laŭ la versaĵo „Historio“ de Nikola Vapcarov.

N. MITEV

GABROVO. La 23-an de decembro pasintjare en la Domo de Kulturo oni notis la 123-jaran datrevenon de la naskiĝo de d-ro Zamenhof. La vespero estis malfermita per plenumo de la E-himno. Pri la vivo de d-ro Zamenhof parolis Ljubomir Dimitrov.

Riĉan belartan programon en Esperanto plenumis lernantoj el la fakultativa E-klaso en lernejo „T. Karpinskaja“ sub la gvido de la instruistino Sonja Tiĥova, la gekursanoj de Djanko Minĉev kaj Stefka Sumkova kaj la studentoj el la E-kurso de Ljubomir Dimitrov.

S. T.

SMOLJAN. La 15-an de novembro pasintjare en la urba planedario okazis solena E-vespero, organizita de E-societo „Kulturo“. Ĝi estis dediĉita al la 75-jariĝo de Bulgara Esperantista Asocio kaj al la 123-jara datreveno de la naskiĝo de d-ro Zamenhof — kreinto de la Internacia Lingvo. Ĉeestis esperantistoj el E-societoj „Diĉo Petrov“ en Ĉepelare kaj „Albatro“ en Varna, kiuj kun intereso trarigardis la modestan fotoekspozicion „El la vivo de Esperanto“.

En sia raporto la esperantisto Georgi Gegov prezentis la vivon kaj agadon de d-ro Zamenhof, parolis pri la rolo kaj signifo de Esperanto, kiu ekzistas jam 94 jarojn.

Esperantistoj el societo „Kulturo“ prezentis belartan programon. La vespero pasis en agrabla etoso.

Maria DIČEVA

VERDAJ STELTOJ

MI ESTAS JAM JUNPIONIR'

Nikolaj ZIDAROV

Kaljaro, la 21^a de decembro, 1982a

Karaj geamikoj,
ni estas feliĉaj ke ni havas multajn
geamikojn kiel vi en la tuta mondo.
Tion ĉi lertan ni sendas al vi kaj al pli ol cent
homoj en diversaj landoj de Eŭropo, Azio, Afriko,
Ameriko kaj Oceanio.
Ni deziras al vi ĉiuj

Plezurajn feriojn
kaj
Feliĉan Nov-jaron.



GELERNANTOJ KAJ
GEINSTRVISTOJ DE LA
ELEMENTA LERNEJO C.E.P.
SEKTORO ESPERANTO
VIA FLAVIO GIOLA
09100 CAGLIARI (SARDIO)
ITALIO

Du jarojn revas mi obŝtine,
pro ĝojo tremas mia kor'...
Ĉu oni min akceptos fine?
Ĉu min elektos kun favor'?

Ĉu mi meritas la kravaton?
Voĉ' vokas min ĉe la spalir'
kaj mi eniras aŭtomate
en aŭlon de la pionir'...

Eniras mi kun ruĝaj vangoj.
Ho, kor'! Ne febru nun pro ard'!
Por mi voĉdonas junfalangoj;
por mi ruĝbrilas la standard'!

Jen iu al mi ekrapidas,
eksonas tuj triumfa kant'! —
al mi kravaton ruĝan ligas
la kara pionirgvidant'!

Kaj mi ekmarŝas post l'akcepto
kun ĝoja kor' kaj kun inspir' —
mi estas Dimitrov-adepto,
mi estas jam junpionir'!


El la bulgara: SIMEON M. SIMEONOV

PASERO

Mika SREBROVA

Pro kio tiel staras vi, pasero,
ne saltetante kaj en malespero?
Verŝajne nigra penso vin ĉagrenas,
ke tre rapide vintra frost' jam venas!

Ne timu kaj ne staru nun ĉagrene!
Panerojn donos mi al vi matene;
en ŝirma lok' vi estos sub tegmento
ĝis kiam venos ree la printempo.





DEZIRAS
KORESPONDI

BRITIO

Bryonie Freeman (18-jara studentino pri lingvoj) — 1 Pemberton drive, Bradford, West Yorks BD7 1RA — kun samaĝuloj pri teatro, muziko, literaturo, biciklado ktp.

FRANCIO

20 komencantoj (12—16-jaraĝaj) deziras ricevi el tuta mondo BK kaj turismajn faldfoliojn en Esperanto, gazetojn k. a. esperantafanojn. Ili deziras korespondi kun geknaboj. Ciu sendinto ricevos filatele afankitan bildkarton. — Esperanto-klubo, Collège V. Hugo, Boulevard V. Hugo, F-58000 Nevers.

Paul Leduc, 31 str. Chambre-aux-Deniers, F-49000 Angers — kun ĉi pri PK.

HISPANIO

Manuel Romero Gomez (65-jara) — Av. de Lugo, 28—2 K. —Pontevedra — T. 842092 — pri kulturo kaj bona amikeco.

ITALIO

≡ Silvia Manca (8-jara knabino) — Via Garlo Pisacane 4 — Pirri, I—09 100 Cagliari.

KANADO

T. James Brenan (49-jara) — 23 Katherose Drive, Willowdale, Ontario M2Y 3P4 — kun ĉi pri ĉiutaga vivo, literaturo, lingvoj, vegetarismo k. a.

VENEZUELO

Gestudentoj-esperantistoj kun ĉi:

S-ino Aura A. Romero, urb. Paimas, Av. Maracay, Ota „Aurimar“ — Caracas 1050 — pri leĝoj kaj muziko;

S-ino Mery Sánchez — Biblioteca Mariano Picón Salas, Parque Aristides Rojas, Av. Andrés Bello, c/c Ppal de Naripérez, Caracas — pri infanliteraturo;

F-ino Carmen Clara Canero, Vereda 60, N°11, Coche, Caracas 1040 — skoltismo kaj plantkultivado.

NI FUNEBRAS

Forpasis **IVAN NIKOLOV ALAĤVERĜIEV** el Varna (20.III.1927 — 27.IX.1982). Li estis esperantisto de 1959, longjara sekretario de la E-societo „Progreso“ en Kubrat — ĝis 1969, kaj kursgvidanto de junularaj kursoj.

Niajn kondolencojn al la funebranta familio.

Sur la unua kovrilpaĝo: Festo de vinberistoj en Sun-gurlare

Sur la lasta kovrilpaĝo: Festado de la Tago de Vinberistoj — Trifon Zarezan. (Oleopentraĵo de prof. Ilija Petrov)

NIAJ PERANTOJ

Britio. S-ro Paul Hewitt, „Laycroft“, Main Road, Covenham Louth, Lincs., LN11 0PF.
Jarabono: 2.50 f. ster.

Ĉeĥoslovakio. Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilska 10, CS-110 00 Praha 1. Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.
S-ro Daniel Papak, Smerova 35/1, CS-04001 Košice.
Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.

Danlando. S-ro J. H. Eriksen, Torholmsvej 26, DK-9800 Hjørring.
Poŝtkonto: 1 48 39 51
Jarabono: 38 kr.

Francio. S-ro Roger Degrelle, B. P. 23. NANCY. F-54510 Tomblaine,
Girkonto: 771.77 R
Jarabono: 20 f.f.

Finnlando. Finna Esperanto-Librejo, PL 221, SF-70101 Kuopio 10.
Jarabono: 24 fmk.

Germana Demokratia Respubliko. Esperanto-Asocio de GDR, Charlottenstr. 60, 108 Berlin.

Germana Federacia Respubliko. S-ro Roland H. Hegen, Schlossgasse 30, D-6738 Elmstein.
Jarabono: 8 DM.

Hispanio. S-ro Adonis Gonzalez Meana, C. Marc. Gonzalez 5—4º dcha., Gijon (Oviedo).
Jarabono: 300 pesetoj

Hungario. „Budapeŝta Informilo“, p. k. 153, H-1443 Budapest.
Jarabono: 60 forintoj.

Japanio. S-ro Yoshiaki Mizuno, 327, Kitairiso, Sayama-shi, Saitama-ken 350-13.
S-ro Namba Syōzi, Huruiti 3-13-26, Zyōtō-ku, Osaka 536.
Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.

Kubo. S-ro Pedro P. Lamas Diaz, apartado 223, Ciego de Avila.

Madagaskaro. S-ro Justin Randriamampionona, Lot: VA 20-BA Tsiadana, 101, Antananarivo.
Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.

Malto. S-ro Anthony Mercieca, 20, Valletta Road, Quormi.
Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.

Pollando. ul. Piekna 16 b/g
PL-00539 Warszawa, s-ro Lech Kosieniak

Portugalia. Portugala Esperanto-Asocio, R. DR Joao Couto, 6 R/C. A, P-1500 Lisboa.
Jarabono: 260 esk.

Sovet-Unio. Johannes Palu, do vstrebovanija, SU-200016 Tallinn, Estonio.
Jarabono: 5 rubloj.

Svedio. S-ro Tord Suård, Lingvägen 201, S-12359 Farsta.
Jarabono: 5 us. dol. aŭ egalvaloro.

Vjetnamio. Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, 222 Dôl Càn, Hanoi.

VITO FRUKTODONA...



Laŭdis sin la kurba vito:
estas mi tre fruktodona,
fruktorica.“

(El popolkanto)

La legendoj rakontas, ke unua la traco Eypeapo plantis la viton en nia tero. Kaj tiam ekiris inter la homoj la traco dio Sabiuso — por enverŝi en iliajn animojn ĝojon kaj esperon pri abunda rikolto. La antikvaj helenoj nomis Sabiuson Dionizo, la romianoj — Bakho.

La sciencistoj akceptas, ke la vito estas transplantita sur nian teritorion jam antaŭ ĉirkaŭ 4000 jaroj. La helena geografo Strabono opinias, ke veninte sur la Balkanan Duoninsulon en la unua duono de la dua jarmilo antaŭ nia erao, la tracoj transportis tiun ĉi mirindan planton el MalgrandAzio. Pri tiu ĉi problemo la specialistoj ne ĉiam samopiniis. Tamen, evidente estas, ke la tracoj unuaj en Eŭropo komencis kulturi la viton kaj produkti vinon. Multaj faktoj atestas, ke jam al la antikvaj helenoj estis konata la pritrancado de la vito. Ili ĝin faris aŭtune aŭ printempe. En la mezepoko oni opiniis, ke la pritrancadon oni devas fari de la mezo de februaro ĝis la mezo de marto, t. e. — en la sama periodo kiel

oni ĝin faras nun. La pritrancado celis transformon de la sovaĝa vito en altproduktivan kulturan planton. Tial ne estas mirige, ke laŭ malnova popola tradicio, ĉiujare je la 14-a de februaro, kiam komenciĝas la pritrancado de la vitoj, oni festas la Tagon de Vinberistoj — Trifon Zarezan (Trifon la Vittrancisto).

La legendo rakontas, ke eĉ kiam ĥano Krum severe ordonis, ke oni ekstermu la vinberujojn, ke estu likvidita eĉ la lasta guto de la „fajra demono“ — la vino, ju maljunulo ne obeis la ordonon de la granda ĥano. Li kaŝe premis la nigrajn kiel gudro vinber-grapolojn, enverŝis la sukcon en argilpotegojn kaj konservis ĝin en profundaj vinkeloj, kiujn li mem fosis. Kaj kiam tamen estis necesa vino por eltrinki la venkan toston el la plej neimagebla glaso — la orforĝita kranio de la bizanca imperiestro Nikiforo, vinon oni prenis el la keloj de tiu ĉi maljunulo. Lia nomo estis Trifon. . . Oni rakontas ankaŭ, ke tiam la vinon oni portis en tukoj — tiom densa ĝi estis, ke ne elfluis el la linŝtofaj sakoj. Ĉar, pro la cara malpermeso, neniu kuraĝis transporti la vinon en barelo aŭ en iu alia ujo.

Ankaŭ hodiaŭ havas per kio laŭdi sin la bulgaraj vinberistoj kaj vinproduktistoj. La vitkulturado estas grava branĉo de nia kamparmstrumo. Oni aplikas altproduktivajn teknologiojn, oni plantas pli bonkvalitajn vinber-specojn. Nia vinberkulturado okupas iun el la unuaj lokoj en la mondo laŭ koncentriteco de la vinberplantejoj. Oni kreis kaj kreas vinberejojn, kies dimensioj atingas dekmilojn da ardekoj. En tiuj grandaj masivoj ĉiam pli kaj pli eniras la plej moderna tekniko kun universala destino. En la vintenejoj de la scien-produktadaj vinberkulturaj kaj vinproduktaj kompleksoj fermentas vinoj, kiujn oni serĉas ne nur sur nia merkato — ilin oni preferas ankaŭ en multaj aliaj landoj.

Ĉar la majstreco de la bulgaraj vitkulturistoj kaj vinproduktistoj kaj ilia laboremo estis transdonataj de generacio al generacio — jam de la tempo de la maljunulo Trifon. . .

Cefredaktoro: Donĉo ĤITROV

Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI

Respondeca sekretario: Lidia RAEVA

Redakta komitato: Marin BAĈEV, Vasil BOROVSANKI, prof. Vasil ĈOĈOV, Dimităr HAGIEV, Krăstju KARUCIN

Administrantino: Kalinka VASILEVA

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919, distingita per ordeno „Ĉirilo kaj Metodjo“ — I grado. Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:

„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97,

1303 Sofio, Bulgario

tel. 31-70-19

Stata presejo „Georgi Dimitrov“, Bul. Lenin 117

P. K. 66

1 000 Sofio